Teknika komisiono, 2023-01-07

Unua kunveno
12:30 UTC+0 ĝis 14:00 UTC+0

ĉeestantoj:
la prezidanto (P.) kaj unu alia persono (A.)

Tagordo:
* enkonduka prezentaĵo
* debato
* farendaj taskoj kun responsuloj

Protokolo:

A. pri ĉiuj servoj: La alternativoj estu alireblaj en ĉiuj landoj.
Ekzemple protonmail.com ne estas alirebla de Ĉinio kaj Rusio.

FAROTA: listo da landoj kun tiaj problemoj

A. pri la YouTube-kanalo:
* registri la laborkunsidojn de kongreso, sed aldoni ilin al iu pasvort-protektita servilo
* aliajn filmentojn oni daŭre povas aldoni al la YouTube-kanalo

A.: neligitaj informoj povas krei malsaman kaj nekongruan bildon de la asocio kaj de la "vivo en la asocio". Ekzemple estas tre malsimilaj debatoj en Telegram kaj en la dissendolisto ol dum la kongreso. Foje oni havas la impreson, ke ekzistas pluraj mondoj.

A.: problemo de malsamaj alir-rajtoj ene de Discord: PKanoj devus esti la nuraj personoj kun aliro al PK-grupo ktp.

A. pri rejeto de SAT: kutime oni nur zorgas pri tio dum kongreso, sed verŝajne bonus, se oni ankaŭ farus ion ekster la kongreso, eble kadre de teknika komisiono.

A. (ne certa): Telegram-grupo estis kreita dum kongreso, oni ankaŭ kreis Signal-grupon

IDEO: ĉu eble kunigi Signal- kaj Telegram-grupojn?

A.: eble demandi al landaj perantoj, kiom da homoj havas retaliron aŭ pretus ekuzi retajn servojn (se ili estus pli facile uzeblaj); aŭ demandi per Sennaciulo

A.: estus bone havi ilon por pli bone interkomunikiĝi inter kongresoj

A.: verki teksteton pri tiu ĉi kunveno, por ke Vinko aldonu ĝin al la SAT-paĝaro kaj publikigu ĝin en Sennaciulo.

FAROTA de la prezidanto

A.: ebla demando por la teknika komisiono: kiel realigi hibridan kongreson?

------

Venonta kunveno:
sabato, 25 de marto